

Johann Wolfgang von Goethe,
Roz' sur erikejo

tradukita de Konrad Matheus

Vidiĝis eta ruĝa roz'
de knab', sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros'.
Hastis li al juna ŝos'
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Diris knab': „Mi rompos vin,
rozo sur erikejo.”
Diris roz': „Dorn' pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Kaj knab' sovaĝa romp'is ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend' roz' pikis lin.
Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin.
Venis sort' sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de
JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 –
†1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

*S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-
33038 Nieheim, Germanio.*

Johann Wolfgang von Goethe,
Knab' rozeton vidis li

tradukita de Joachim Gießner

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.“
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de
JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 –
†1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER
(*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en [http://arkivo.
esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf](http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf).*